

LA ETULO

MONATA GAZETO ILUSTRITA POR GEKNABOJ


JARABONPREZO : 10 fr. fk. aŭ samvalora monsumo

21, Rue de Rocroy - PARIS-X°



AVIDO

Ho! la bonegaj sukeraĵoj! ĉu ni ne povas gustumi? ,




Bileto de la Onklo

KARAJ GENEVOJ,

Unu el miaj ĝentilaj nevinoj skribis al mi, ke ŝi zorge konservas ĉiujn numerojn de *La Etulo* en paperujo. Mi esperas, karaj genevoj, ke vi ĉiuj tiel agas, ĉar post kelkaj jaroj la tuta kolekto de nia gazeteto fariĝos tre interesa libro, kiun vi mem ree trarigardos kun ia plezuro. Cetere mi intencas organizi inter vi allogajn konkursojn kaj doni al la plej lertaj el vi belajn premiojn. Kaj por tiuj konkursoj la kolekto de *La Etulo* estos ne nur utila, sed eĉ necesa. Mi do instigas vin konservi la kolekton de nia etula gazeto.

En ĉi tiu numero, la direktoro, kiu estas terura homo — konfidencie, ĉu ne? — permesis, ke mi prezentu al vi literaturan ĉefverkon, originale verkita en angla lingvo kaj lerte tradukita en esperanto. Temas pri *Fabiola*, romano pri la katakomboj, kies aŭtoro estis Kardinalo Wiseman. Kelkaj personoj en tiu rakonto estas knaboj, kaj mi pensis, ke vi plezure konatiĝus kun unu el ili, certe la plej ĉarmiga, la etulo Pankraco. Tial mi enpresigis poste la ĉapitron II-an de tiu kortuŝa rakonto, titolita: « Filo de Martiro », ĉar la patro de Pankraco estis martirigita pro lia kredo al Kristo. Vi certe admiros la kuraĝon de Pankraco. Laŭ lia ekzemplo estu vi ĉiuj, Karaj Genevoj, ankaŭ kuraĝuloj en ĉiuj cirkonstancoj de via vivo!

ONKLO BOB.



La avara avo

— Paĉjo, jen almozulo!
 — Almozulo? Kie li estas?
 — Sur la ŝtona benko ĉe la pordo li sidas.

— Mi vidas neniun!
 — Ĉu vi vere ne vidas lin? Sed mi vidas lin klare. Rigardu! Li petas almozojn.

— Do iru en la domon kaj portu al li panon, viandon kaj iom da vino, por ke li satiĝu kaj povu antaŭeniri!

— Jes, paĉjo! Li aspektas kiel granda mizerulo. Li ploras, preĝante... Mi tre kompatas lin.

La kavaliro kapbalancante trapaŝis la korton de sia malnova kastelo; lia fileto enkuretas la domon. Reveninte, li alparolas la sidantan, ĉifonvestitan malriĉulon:

— Prenu kaj satiĝu!

— Mi dankas! Mi ne povas manĝi! forpeli min!

— Ke mi forpeli vin? Kial vi venis?

— Por ke mi estu forpuŝita de via domo!

— Via diro estas miriga! Mi ne havas kuraĝon! Mia patro ĉiam diras al mi, ke mi helpu kaj subtenu mizerulojn, por ke mi iam povu feliĉe morti kaj trankvile daŭrigi mian postmortan vivon! Mi do tiel faras kaj mi ne povas forpeli vin! Mi ne volus esti tiel malnobla, kiel iam estis mia avo avarulo. Li al neniuj almozpetantoj donis manĝaĵojn kaj fine li tre malfacile disigiĝis el la vivo, kriante pro pento kaj timante la morton.

— Jes, li tre malfacile mortis kaj estis terure punita. Lia animo nun mem petas almozojn, ĉirkaŭvagante la mondon. Kiam tiom da homoj lin estos forpelintaj, kiom da mizeruloj li mem estis puŝinta el sia kastelo, tiam li nur estos liberigita de tiu-ĉi malfeliĉa vivo.

— Kiel vi ĉi tion povas scii?

— Kara infano mia, mi mem estas via avo, la malfeliĉulo!

— Vi estas mia avo! Ĉu ĉi tio estas ebla?

— Jes! diris la almozulo.

Antaŭ la okuloj de la knabo subite aperis riĉe vestita, fieraca homo, rajdante sur belega ĉevalo. Maljuna, malsana almozulo, sangfrapita per vipo, forkuretis, kriante:

— Ho, vi aĉa, avara, malkompatema besto, Dio vin punos kaj vi mem iam devos almozpeti!

Ili ambaŭ malaperis, la avo denove ekploris kaj kune kun li la knabeto, frustrante:

— Vi do estas mia malfeliĉa avo! Mi nun ekkonas vin! En nia salono pendas via bildo. Oni diras, ke ankaŭ ĝi ploras, larmversante.

— Jes, jes! Kaj mi nun venis, por vidi vin kaj montri min al vi, por ke vi sciu, kia malfeliĉulo estas via avo, kaj por ke almenaŭ vi forpelu min! Sed mi longe ankoraŭ devos vagadi tra la mondo, ĉar ĉie vivas multe da bonaj homoj, kiuj ne forpuŝas min for de si. Restu do dum via tuta vivo tiel bona kaj honesta, kiel vi estas nun, kaj vi mortos feliĉe kaj trankvile! Nun forpelu min!

— Ankaŭ mi ne povas tion fari, plej kara avo mia; mi ne kuraĝas esti malbona!

La knabo ploris kun klinita kapo; la avo jam estis malaperinta.

— Patro, patro! ekkriis la knabeto. Mi vidis mian avon...

— Vian avon? demandis la patro, alkurinte.

— Jes, vian patron...

La knabo rakontis ĉion kaj ili ambaŭ ekrestis longe silentantaj...

FRANJO MODRIJAN.

PRAVIĜO

— Vi ŝtelis botelon da vino. Kion vi povas diri?

— Sur la montrejo estis skribite: *Kunportota vino.*

Kantas patrineto...

I.

Dormu, infaneto,
Dormu tie ĉi;
Kantas patrineto,
Kantas, apud vi!

II.

Songu, filineto,
Songu nur pri li:
Mortis la patreto,
Estas solaj ni!

III.

Lin, ho knabineto,
Ni ne vidos plu,
Vi kaj patrineto,
Nun orfinoj du!

IV.


Preĝu kun espero,
Ke ne mortu mi;
Tiam sur la tero
Restus sola vi!

V.

Kantas, singultante
La mizerulin';
Dormas sonĝetante
La senkulpulin'...

Originale verkis

FRANJO MODRIJAN.



Bonaj amikoj.

Filo de Martiro

El tiraĵo el « FABIOLA »

rakonto pri la katakomboj
de Kardinalo WISEMAN

el la angla lingvo tradukita de E. RAMO (1)

Rapide alproksimiĝas viva junulo, kun gracia, plaĉa vizaĝo. Li pasas tra la *atrium*, kaj eniras la internan korton.

La alvenanto estas ĉirkaŭ dek-kvarjara, altkreska, kun eleganta staturo kaj vira teniĝo. Liaj nudaj kruroj, brakoj kaj nuko estas fortaj de saniga ekzercado; lia vizaĝesprimio montras la sentojn de lia varma, sincera koro. Vigla inteligento brilas sur lia frunto, enkadrigata de brunaj, krispaj bukletoj. La kutima junula vestaĵo, la mallonga tuniko *praetexta*, kovras lian korpon ĝis post la genuoj; ĉe lia kolo pendas ora, kava sfero (*bullā*). Maljuna servisto lin sekvas, portante kunligitan faskon da velenaj volvaĵoj. Tiu detalo montras al ni, ke li revenas el lernejo.

La patrino tuj ĉirkaŭpremas la junulon en siaj brakoj; kaj li eksidas, apud ŝi, sur malaltan benketon. Dum kelka tempo ŝi rigardas lin silente, kvazaŭ por legi sur lia vizaĝo la kaŭzon de lia eksterordinara prokrasto: li ja revenis hejmen unu tutan horon pli malfrue ol kutime! Sed liaj okuloj brilas tiel sincere kaj senkulpe, ke la patrino koro rekvietiĝas.

— Pro kio vi malfruiĝis hodiaŭ, kara filo, ŝi tamen demandis. Nenia malagrablo okazis al vi, espereble, dum la reveno?

— Ho ne! tute ne, dolĉega patrino, respondis la knabo. Kontraŭe, tian ĝojon mi eksentis, ho tian ĝojon!... pri ĝi mi apenaŭ kuraĝas paroli al vi!...

Protesta rideto de la patrino ellogis el la naiva vizaĝo gajan ekridon:

(1) Kun speciala permeso de la Eldonfirmo *Espero Katolika*.

— Vi do deziras, ke mi diru ĉion? komencis li. Cetere vi ja scias, patrino, ke mi ne estas feliĉa kaj ne povas dormi pro maltrankvilo, se mi ne ĉiutage diras al vi ĉion bonan kaj malbonan pri mi mem.

La patrino denove ridetis, demandante al si, kia povus esti tiu malbono ĉe la simplanima junulo.

— Mi legis antaŭ kelkaj tagoj, daŭrigis la knabo, ke Skitoj en urnon ĉiuvespere ĵetas ŝtoneton blankan aŭ nigran, laŭ tio, se la tago por ili estis feliĉa aŭ ne. Por mi, la blankaj aŭ nigraj ŝtonetoj montras la tagojn, kiam estis eble al mi, aŭ ne, rakonti al vi ĉion, kion mi faris!... Sed hodiaŭ la unuan fojon, mi hezitas... mi sentas konsciencotimojn... ĉu mi estos prava, se mi ĉion diros?...

La emocio kredeble montriĝis sur la vizaĝo de la patrino... aŭ plena zorgemo malklarigis ŝiajn okulojn, ĉar la junulo rekvietige kaptis ŝian manon, kaj kore kisis ĝin.

— Ne timu, plej amata patrino, li karese diris, via filo nenion faris, kio povus ĉagreni vin. Nur diru, ĉu vere vi volas scii ĉiujn detalojn pri mia malfruiĝo?


— Diru al mi ĉion, kara Pankraco, ŝi respondis. Al mi nenio estas indifereanta, kio concernas vin.

— Nu, patrino dolĉega, dum ĉi tiu tago... la lasta, kiun mi pasigis en la lernejo... mi ricevis specialan favoron de Dio. En la daŭro de tiu tago okazis strangaj aferoj. Unue, mi ricevis premion kiel sukcesinta konkuranto pri la deklamado, kiun nia instruisto *Cassianus* ordonis prepari dum la matenaj horoj.

« Tio kondukis al eksterordinaraj malkaŝiĝoj.

« La temo de nia deklamado estis la jena: *Vera filozofa devas esti ĉiam preta morti por la vero.*

« La verkaĵoj de miaj kamaradoj estis... Sed pri tio ili ne estas kulpaj, la kompatinduloj! Kian veron ili povas posedi? Kio instigus ilin doni sian viv-



Karavano en la Sahara-dezerto.

on por ia vanta elpenŝaĵo?... En la spirito de Kristano, kontraŭe, tiu temo naskas mirindajn ideojn. Tion mi spertis hodiaŭ: mi memoris viajn instruojn kaj la ekzemplojn viditajn en mia hejmo. Kaj dum mi legis la verkaĵon, entuziasmo min preskaŭ perfidis. Miaj lipoj el-lasis la vortojn «Kristano» anstataŭ «filozofo», kaj «Kredo» anstataŭ «Vero»... Ĉe la unua eraro *Cassianus* surprize eksaltis. Sed la duan fojon larmo ekbrilis en liaj okuloj; li kliniĝis al mi: «Atentu, mia infano», diris li, mallaŭte, «aŭskultas akraj oreloj!»

— Kion? interrompis la patrino. *Cassianus* estas do Kristano?... Liajn instruojn mi elektis por vi, ĉar ĝi estas la plej fama laŭ laoj kaj moralaj principoj. Kore mi nun dankas Dion pro la elekto. Malfeliĉe, ni, Kristanoj, ĉirkaŭ-

ataj de danĝeroj kaj timigaj antaŭsentoj, devige vivas kiel fremduloj en nia propra lando, kaj apenaŭ konas la vizaĝojn de niaj fratoj. Kompreneble, se *Cassianus* publike proklamus sian kredon, ĉiuj lernantoj baldaŭ forlasus lin... Sed daŭrigu, mia filo. Ĉu estis seriozaj motivoj por lia malkvietiĝo?

— Tion mi timas. Ĉar jen kio okazis: miaj kamaradoj, kiuj tute ne atentis pri la specialaj, senkonsidere ellasitaj esprimoj, laŭtege aplaudis mian deklamadon. Sed Korvino ekrigardis min, sulkigis la brovojn, kaj la lipojn li kolere mordetis.

— Kiu estas li, Pankraco? Pro kio li tiel malkontentiĝis?

— Li estas la plej granda, la plej forta, sed ankaŭ... la plej malvigla el la lernantoj. Pri tio mi kompreneble

ne kulpigas lin, sed preskaŭ ŝajnas, kvazaŭ li ma'amus min. Kial?... Mi ne povas diveni.

— Ĉu li ion diris al vi?... Ĉu li atakis vin?

— Jes: tiukaŭze mi revenis malfrue. Kiam, elirinte el la lernejo, ni alvenis al la kampo ĉe la rivero, li insultis min en la ĉeesto de miaj kamaradoj: «Pankraco, kriis li, furioza, ni renkontiĝas ĉi tie kredeble lastafoje, sed nun vi elpagos al mi ĉion jam de longe ŝulditan! Malice vi fanfaronis en la lernejo pri via supereco super mi, super aliaj pli aĝaj, pli lertaj ol vi... Mi notis, kanajlo, kiel vi rigardis min, dum vi elŝutis vian hodiaŭan arogantan parolaĉon! He! He! li kolere rikanis, esprimojn mi ekkaptis, pri kiuj vi eble pentos... tre baldaŭ! Mia patro, vi scias, estas Prefekto de la Urbo!»

Ĉe tiuj vortoj la patrino ekstrems. La knabo daŭrigis:

— «... Io prepariĝas, kio eble koncernos vin! Sed antaŭ via foriro el ĉi tiu loko, mi venĝos min kontraŭ vi! Se vi estas ĝusta je via nomo (1)... se tiu nomo ne estas ironie elektita... tiam, ni interbatalu malkaŝe, per armiloj pli viraj ol grifelo kaj tabuleto (2)! Luktu kun mi, aŭ ataku min per cesto (3)!... Ha fripono! mi brulas pro deziro humiliĝi vin laŭ via merito, en la ĉeesto de ĉiuj kunlernantoj, kiuj vidis vian insulteman triumfadon!»

La patrino antaŭenkliniĝis, maltrankvila, senspire aŭskultanta.

— Kion respondis vi, mia infano? demandis ŝi avide.

— Mi diris al li, tute kviete, ke li eraras, ke mi neniam konscie agis ofende kontraŭ li aŭ kontraŭ la aliaj kamaradoj. Neniam mi pretendis al la supereco super ili! «Korvino, mi aldonis, pri via

(1) *Pancratium* estis kombinata ekzerco de luktado, pugnobatado, ktp.

(2) Lernejoj skribiloj. Tabuleto kovrita per vakso, sur kiu oni skribis, per pinta grifelo, literojn forigeblajn per la plata ekstremaĵo de la grifelo.

(3) Manprotektiloj uzitaj dum pugnotuktoj.

propono... vi ja scias, ke mi ĉiam rifuzis tiujn batadojn. En la komenco, oni nur konkuradas pri forto kaj lerteco... jes... sed poste oni ekscitiĝas, oni ekkoleras, oni fariĝas vengema. Ĉefe hodiaŭ mi absolute rifuzas: vi ja ĵus konfesis, ke jam vi estas kolera, kaj volas vin venĝi!» Ĉirkaŭ ni staris, amase, la knaboj. Ĉiuj senpacience atendis, sed nun ili riproĉis min, ĉar ili esperis ĝui la krudan ludadon. Mi nur aldonis: «Adiaŭ, kamaradoj! al vi estu donata ĉia feliĉo! Mi disiĝas de vi, kiel mi ĉiam inter vi laboris, en paco!»... «Tute ne! eksplodis Korvino, kun vizaĝo ruĝa de kolero, vi...»

Ĉe tiuj vortoj, la knabo ruĝiĝis, lia tuta korpo ekstrems, kaj li murmuris per duonsufokata voĉo:

— Mi ne povas... mi ne kuraĝas diri plu...

— Pro Dio mi vin petegas, pro amo al la mortinta patro, pledis la patrino, metante la manon sur la kapon de sia filo, nenion kaŝu al mi! Ĉiam mi estos maltrankvila, se vi ne ĉion diros al mi! Kio okazis poste?

En silenta, mallonga preĝo la knabo ĉerpis novajn fortojn kaj daŭrigis:

— Korvino tiam terure ekkoleris: «Vi kredas, malkuraĝulo, kriis li, ke vi tiamaniere elglitos el miaj manoj, fiadoranto de azenkapo (1)! Neniam vi bonvolis diri al mi, kie vi loĝas, sed mi eltrovos!... Ĉiuokaze ricevu tiun garantiĝon de mia venonta venĝo!» Tion dirante, li frapis min sur la vizaĝon per terura bato, kiu preskaŭ faligis min. Eksonis ĉirkaŭ mi, el ĉiuj buŝoj, sovaĝa ĝojkrio.

La knabo ekploris. Sed baldaŭ ekregante sin:

— Ho patrino, li daŭrigis, en tiu momento mia sango ekbolis. Al mi ŝajnis, ke mia koro rompiĝos. Moka voĉo ripetadis en mia orelo: «Malkuraĝulo! malkuraĝulo!»... Certe ĝi estis demona voĉo! Mi konsciis, ke pro ekscito mi havis forton sufiĉan por ekkapti la in-

(1) «Adoranto de azenkapo», idolana mokonomo pri Kristanoj.

sultinton je la kolo, kaj senpovigi lin! Mi kvazaŭ jam aŭdis la aprobajn kriojn, kiuj akompanus mian venkon, kaj revarbus al mi la amikecon kaj estimon de ĉiuj... ho terura tento! Dio ne permesu, ke denove la malbono tiel forte min ataku!

— Kaj poste, kio okazis? demandis, tremante, la patrino.

— Mia gardanta anĝelo helpis min subpremi la demonon, respondis la junulo. Mi pensis pri mia Dia Sinjoro en la domo de Kaifo, ĉirkaŭata de mokantaj malamikoj, hontige frapata, sed ĉiam milda, pardonema. Ĉu mi ne devas imiti Lin? Mi prezentis la manon al Korvino, dirante: «Dio pardonu al vi, kiel mi pardonas! Lia beno vin akompanu!»... Ĝuste en tiu momento alvenis *Cassianus*. De malproksime li ĉion vidis: ĉiuj rapidege diskuris. Pro nia komuna kredo (kiun ni konfesis unu al la alia), mi petegis lin, ke Korvino ne estu punata pro lia konduto. Tion li promesis al mi... Kaj nun, patrino dolĉega, murmuris la knabo per amoplena, karesa voĉo, ĉu mi ne prave nomis tiun tagon feliĉa?



Bob eliras por matena rajdado.



Ora Birdeto

I.

La birdeton oran kaptis
tri junaĝaj knabetoj.
Kiu nun el ili havu
birdon deliratan?

II.

La birdeto ora diris:
«Lasu min libera —
kaj dezirojn tri plenumos
mi! Nur ekparolu!»

III.

La unua knabo diris:
«Donu g'ason tian,
ke senĉese mi trinkados!»
«Havu deziriton!»

IV.

Kaj la dua ekparolis:
«Donu sakon tian
ke ĝi estos ĉiam plena!»
Peton ĝi plenumis.

V.

Sed la tria knabo diris:
«Donu koron tian
ke eĉ en malbonaj tagoj
restos mi humora!»

VI.

Ĉiu deziritan havis,
trairante mondon,
ĉiu siamaniere
vivis sur la mondo.

VII.

La unua — nur trinkante —
kuŝis vojfalinte:
inter netaŭguloj dua
kriis, kartludante.

VIII.

Frumatene sin la tria
levis, laboronte,
sed vespere li revenis
ĉiam ĝojkantante.

El la slovena lingvo esperantigis

FRANJO MODRIJAN.

OOOO

PUNITA MANĜEMO

(Senvoja rakonto)

